# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2015

*Kara Leganto, dume en Analoj de historio perdiĝis la aŭgusta numero de nia bulteno, estis preparita la sekvanta, septembra eldono. En du lastaj ni aperigas informon pri la Centa UK en Lillo, farita de membroj de nia E-societo. En mezepoka Francio, post la morto de reĝo, oni proklamis: "La reĝo mortis… Vivu la Reĝo!" Hodiaŭ, transformante la ĉi frazon, oni povas diri: "Dankon al bonega kongreso en Lillo! Ek la la slovaka Nitro!"*

*Krom la reklamo en ĉi n-ro de "Saluton!" vi trovos ankaŭ poemon de la renoma ukraina poeto, viktimo de sovetia komunisma reĝimo, kandidato al la literatura Nobel-premio Vasil Stus – oni parolos pri Li dum la septembra kunsido. Ĝis la!*

*–La Redaktoro*

101-a Universala Kongreso de
ESPERANTO
23.-30.07.2016 Nitra,Slovakio






## Sukcesega UK en Lillo - II

Antaŭ dekoj da jaroj, dum mi komencis lerni la francan lingvon, mia instruistino suspektis min mensogi pri mia komencanteco, ĉar (malsame al la samklasanoj) mi jam multon komprenis – simple pro mia antaĉa kono de Esperanto! Sed por aktive ekregi la francan lingvon mi neniam havis paciencon – tro malfacila.

Tamen, mia malnova revo viziti Francion realiis ĉi jare nur dank'al kaj per Esperanto, kiu fine kondukis min al la lando de Napoleono kaj Pasteur. Mi vere bezonis Esperanton tie. La 100a UK en Lillo kaj samtempaj E-eventoj multe helpis. Mi venis al la tombo de Napoleono kaj al la pinto de Eifel-turo dank al esperantistoj aranĝintaj enhavoriĉan antaŭkongreson en Parizo.

La 100a UK en Lillo arigis preskaŭ 2700 tutmonddevenajn, diverslingvajn alilandanojn, el kiuj multaj, same kiel mi (sen la franca lingvo) povis funkcii dum la kongresa semajno nur per Esperanto. Krom abunda programo en la vasta Kongresejo, ni estis videblaj en la stratoj de Lillo, ĉar multaj eventoj okazadis publike.

Ni ekskursis al Bulonjo-sur-Maro, kie antaŭ 110 jaroj okazis la 1a UK. En la sama teatro ni denove aŭdis la festparoladon de nia Majstro – d-ro Zamenhof. Amasa gaja marŝado okazis tra la urbo de la stacidomo ĝis la urbodomo, kie la Urbestro akceptis nin.

*–D-ro Leszek Kordylewski*

## Sukcesega UK en Lillo - III

En la malferma ceremonia dum la parolado de Mark Fettes, oni spertas, ke subite la enhavo estis iom nekutima. Li menciis teknologion, kiun oni ne plus uzas, ekzemple telegrafo. Evidentiĝis ke li estis citanta la paroladon de Zamenhof de la unua esperanta kongreso: la UK-1 de Bulonjo-ĉe-Maro.

La franca esperanta movado estis kaj estas grava parto de la esperanta movado. Pro tio oni elektis Bulonjo-ĉe-Maro, kiu estis vojkruciĝo inter Francio kaj Anglio, kiel loko por la una esperanta kongreso. Ĉi jara kongreso havis 2700 partoprenantojn kaj pro tio oni ne eblis kunveni ĉi jare en la sama loko. Anstataŭ tio oni elektis proksiman pli grandan urbon – Lillo. Tamen la alta protektanto de la ĉi jara kongreso estis la urbesto ☞

de Bulonjo-ĉe-Maro. Aldone multoj da la kongresanoj ekskursis al Bulonjo-ĉe-Maro. Tie oni vizitis la stacidomon, kien alvenis la unaj kongresanoj en 1905, kaj la teatron, kie okazis la iama kongreso. La ekskusantoj de ĉi jaro vidis memoraĝojn de la komenco de la esperanta movado kaj poste spektis vidbendon pri Zamenhof dum la iamaj kongresoj. Ĉe la stacidomo estis starigita busto al la Majstro kaj la urbestro solene anoncis pri la aranĝo de E-kulturdomo en la urbo. Koran dankon!




Poste estas bonega tagmanĝo en kelkaj restoracioj. Posttagmeze estis kelkaj eblecoj. Unu estis viziti la urbeton de Wimereux, kiu estis unu de la unaj feriaj marbordoj de Francio. La unuaj kongresanoj ankaŭ vizitis ĝin kaj eĉ hodiaŭ restas feria domo, kiu nomiĝas "Esperanto".

Tiu ekskurso estis bona okazo pripensi la kialojn de la kreo de Esperanta Movado, ĉar estis multaj restaĵoj de la batalema historio de Eŭropo. Estis la monumento de la granda armeo de Napoleono. Estis amaso da urbetoj en Francio kun nederlandaj nomoj. Tiel oni bone komprenas, kial la Esperanta movado tiam tiel urĝe estis bezonata. Ni, kiuj konscias la daŭran batalemecon de nia mondo, konstatas, ke la Esperanta movado ankoraŭ estas bezonata. *–Marko Ŝafrot*

# Novaj Libroj Eldonitaj kun ESF-subteno

Nova libro, kies eldono estis subvenciita de ESF, debutis ĉi-jare dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lillo: *UEA en konscio de esperantistoj* de Zbigniew Galor kaj Jukka Pietiläinen.

*UEA en konscio de esperantistoj* estas detala sociologia esploro pri la Esperanto-movado, kiu daŭrigas kaj kompletigas la sociologiajn verkojn de Peter Forster, Frank Stocker kaj Nicolas Rašić. La ideo de tiu ĉi esploro naskiĝis dum la 93-a UK en Roterdamo, kaj la enketado komenciĝis okaze de la UK en Bjalistoko. La unua parto de la libro prezentas la rezultojn de tiu kvanta esploro: ĝi skizas portreton de la respondintaj esperantistoj, interalie, rilate al la Esperanto-kulturo, motivoj interesiĝi pri Esperanto, opinioj pri UEA kaj la UK-oj, UEA-membreco (forlaso, reveno, tipoj de membroj), ktp. La aŭtoroj prezentas la bildon de UEA el la perspektivo de FLAM (SWOT)-analizo (analizo de fortoj, malfortoj ["lamaĵoj"], avantaĝoj kaj minacoj), kaj ili prikomentas la kontraŭdiron inter la internaj kaj la eksteraj celoj de la organizo. La dua parto de la libro traktas la imagojn pri UEA en pli larĝa sociideologia kunteksto: ekzemple, ili traktas la interligon de Esperanto kun socialismo kaj kapitalismo, interkomunikan problemon kaj ideologion, kaj, fine, lingvan imperiismon. La verkon kompletigas impona listo de elektitaj publikaĵoj pri sociologio de Esperanto. *–ESF*

# Esperantaj Anoncoj

Oni invitis esperantistojn en Usono partopreni la Kuban Esperantan Kongreson en Havano ekde la 18-a ĝis la 22-a de novembro. Orlando Raola (prezidanot de E-USA) aranĝas, ke grupo vojaĝos laŭleĝe al Kubo por ĉeesti la Kuban kongreson. Se vi havas intereson pri la groupo kaj deziras pli da detaloj, bv. peti detalojn de Bill Harris, Esperanto-USA, eusa@esperanto-usa.org, 510-653-0998.

Kastelo Gresillon (+33 - 241 89 10 34, kastelo@gresillon.org) invitas al:
16a ĝis 20a de oktobro 2015 : **Korusa renkonto**, retejo www.gresillon.org/koruso
24a de okt. ĝis 1a de nov. 2015: **kursaro AŬTUNE**, retejo gresillon.org/autune
+ AMO-seminario 'Grimpi la monton granitan' kun Stefan MacGill
+ Lingva seminario kun Christian Rivière + Rekta metodo kun Zsófia Pataki
+ Speciala programo por infanoj, inkl. Halovena vespero + Aliaj interesaj aktvaĵoj

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Septembra-Novembra kunsido okazos laŭ la adreso: 1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

**22an de Septembro** – Vasil Stus kaj Nobel-premio (Araneo).

**27an de Oktobro** – Temo estos anoncata

**Vasil Stus** ~ Tradukis Kris Long

* * * * * * * * * *

Jen mia tuta spac' – kvaroble kvar.
Rigardu nur: jen muro, jen angulo.
Skorisiringa griz' formanĝis tutan
animon per rompita stratimplik'.
Pli for ol mort' – Ukrainio kara.
Barilo, puto, du fenestroj tristaj
estingiĝantaj en vespera brul'.
En ĉiu vitro – kvazaŭ du braĝeroj –
melankolia okulparo. Vi,
patrino mia sancta, ho kukolo!
Al vi mi jam ne povas vojon peti,
eniri vian nokton kaj sendormon.
Atendu min. Atendu min. Atendu.
Eĉ vane, sed atendu min, beata.
Kaj preĝu la Sinjoron. Se mi mortos,
atendu min ankoraŭ de l'transmond'.